

STARTO

N-ro 4/2023 (289)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto O. A. Fischer

**ĈEA-konferenco en Prudká
28. 9. – 1. 10. 2023**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupu@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

KONFERENCO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

septembre 2023

La konferenco de ĈEA efektiviĝis ĉi jare dum 4 tagoj, en agrabla turisma restadejo PRUDKA ĉe Tišnov, proksime de Brno.

Feliĉe oni eluzis festotagon de nia Respubliko, la 28-an de septembro, do la konferenco povis esti je unu tago pli longa. Estis sufiĉe da tempo por pritrakti gravajn temojn, same kiel amuziĝi ĉe tabljaj ludoj en Esperanto, kantado, vizito de interesaj proksimaj lokoj, societa vespero kun muziko kaj dancado ktp.

Estis avantaĝo, ke kaj konferenca ĉambro, manĝejo kaj loĝo-ĉambroj situis en unu domo. (Kelkaj homoj loĝis en bone ekipitaj, belaj proksimaj kabanjoj).



Jam la unua tago (posttagmezo) de la konferenco ekinteresis la venantajn samideanojn: oni ludis tabloludojn uzante Esperanton (sonis ofta ridado ĉirkaŭ la tabloj) kaj post vespermanĝo oni aŭskultis informon pri plano de kreo de novaj, modernaj retpaĝoj de E muzeo en Svitavy. Fine de la vespero okazis kantado.

La dua tago de la konferenco komenciĝis denove per tabloludoj. Sekvis komuna promeno al proksima malnova ligna

ponto kaj posttagmeze vizito de „familia ĝardena fervojo“ en urbeto Drásov.



Vespere okazis parolado pri skribado por Vikipedio, informo kun lumbildoj pri 108-a UKo en Torino kaj pri aliaj Esperanto-aranĝoj ĉi jaraj, invito al 109-a UKo en afrika Aruŝo 2024 kaj aliaj programeroj.




Sabate, la trian tagon de la konferenco, okazis kunveno de anaro. Komence virtuale salutis la konferencon Esperanto-ĉefuloj el Germanio, Aŭstrio, Belgio ... eĉ de afrika Aruŝo.



La komitatanoj prezentis kaj pritraktis kutimajn temojn, kiaj estas agado de ĈEA, mastrumado, agado de E-klubo. Okazis raporto de ĉefdelegito de ĈEA por UEA. Petr Chrdle prezentis novajn librojn de sia eldonejo KAVA-PECH.

Prezidantino de la E-klubo en Česká Třebová venis nur por antaŭtagmezo por informi la samideanojn pri konferenco de ĈEA 2024 en sia urbo, por inviti ĉiujn.



Posttagmeze oni entreprenis ekskurson al belaspekta vere malnova burgo Pernštejn. Post reveno daŭrigis la anara kunsido per informo de slovaka gasto Peter Baláž pri novaĵoj de lia eldonejo Espero kaj pri plej freŝaj projektoj de lia agenturo E@I.

Sekvis sprita, interesa informo kun lumbildoj pri 25 buntaj, agoplenaj jaroj de praga E-grupo E-mental'.




Oni povis provi novan ludon, kiun alportis slovaka gastoj, ludon „Vortoj“ - moviĝu kaj lernu.



Post vespermanĝo sekvis societa vespero kun bela muziko, danco kaj riĉa tombolo. Ŝajnas, ke ĉiuj bone amuziĝis.

Dimanĉe, la lastan tagon de la konferenco, la prezidanto de ĈEA parolis pri plano efektivigi UKon 2025 en Brno, ĉefurbo de nia Moravio. La anoj povis diskuti pri tiu ĉi projekto. Peter Baláž parolis pri bonaj cirkonstancoj okazigi la kongreson en la jaro 2025.





Sinjoro Košecký el Slovakio, kun-aŭtoro de nova E-slovaka vortaro, prezentis sian prelegon Kritika prijuĝo de Fundamento. Jindřiška Drahotová montris per lumbildoj siajn novajn librojn.



La tutan tempon dum la konferenco la ĉeestantoj povis skribe esprimi sian opinion, novajn ideojn ktp. ĉe enketo kun 4 temoj: kion faru ĈEA dum venontaj jaroj, kion ĝi ne faru, en kio ĝi sukcesis, kion ĝi ŝanĝu, kaj plenumi demandilon koncerne okazadon de E konferencoj (en kiu monato prefere okazigi la konferencon, por kiom da tagoj, kian programon prepari ktp.)

La konferenco finiĝis per kreado kaj posta aprobo de rezolucio.

Oni povas diri, ke la konferenco estis vere sukcesa: estis pritraktitaj gravaj temoj kaj okazis ankaŭ amuza programo. La loĝado estis agrabla kaj manĝaĵo vere bongusta. Krome regis tre bela vetero.

Kunvenis ĉirkaŭ 50 samideanoj kaj la atmosfero estis kaj labora kaj amika.

Dankon al la komitato de ĈEA por sukcesa paso de la konferenco!

L. Chaloupková

P.S. Ni havis junan gaston el Aŭstrio (sur la komuna foto tute maldekstre) kaj la malsaniĝinta Václav Zouzalík aliĝis virtuale por klarigi de la ekrano la situacion de nia junularo.



Nova saltoludo por ekzercoj vortojn



Transdono de diplomoj por KER-ekzamenoj

Usnesení konference Českého esperantského svazu,

**která se konala v Prudké od
28. září do 1. října 2023**

Konference ČES schvaluje:

1. zprávu o činnosti ČES přednesenou předsedou J. Tomečkem;
2. zprávu o hospodaření a členské základně ČES přednesenou pokladníkem A. Švubovou;
3. zprávu o činnosti klubů přednesenou L. Chaloupkovou.

Konference ČES bere na vědomí:

1. zprávu delegáta UEA P. Chrdleho;
2. pořádání konference v České Třebové v roce 2024.

Konference ČES vyzývá:

1. členy přispívat do Starta, na Wikipedii, na web esperanto.cz;
2. členy zvyšovat svou jazykovou úroveň a snažit se o složení jazykových zkoušek.

Konference ČES pověřuje výbor:

1. vyhodnotit líheň nápadů a informovat o výsledcích členskou základnu nejpozději do termínu konference ČES 2024;
2. vyhodnotit anketu *Atraktivita akcí* a informovat členskou základnu nejpozději do termínu konference ČES 2024;
3. pokračovat v jednání o společné akci s GEA v roce 2026;
4. usilovat o získání pořadatelsví UKo v Brně v roce 2025;
5. zjistit podmínky pro pořádání hybridních (fyzická a online) setkání;

6. připravit návrh stanov ČES zohledňující možnosti hlasování na hybridních setkáních.

V Prudké 1.října 2023



Invito al la venontjara konferenco
en Česká Třebová



Dum la konferenco funkciis Libroservo



Novaj libroj de la eldonejo Espero

Kunveno en Esperanto-Muzeo Svitavy

kun inaŭguro de nova ekspozicio
„90 jaroj de Esperanto en Svitavy“
kaj „15 jaroj de Esperanto-Muzeo“
de la 8-a ĝis la 9-a de septembro 2023

La aranĝo komenciĝis vendrede la 8-an de septembro 2023 en la salono super la muzeo, kie la ensemblo DOMA prezentis dramon Reĝo Lávra laŭ Karel Havlíček Borovský. En la muzeo mem Jakub Heřmanský prelegis pri ŝipveturo ĉirkaŭ la Norvegio.



Sabate je la 9-a horo estis inaŭgurita nova ekspozicio pri 90-jaroj de Esperanto en Svitavy kaj 15 jaroj de la muzeo, kiun partoprenis ankaŭ la urbestro David Šimek kaj eksa direktorino de la urba muzeo Blanka Čuhelová, kiu tre meritis pri la fondo de nia muzeo. Venis ankaŭ gastoj el Slovakio.



Libuše Dvořáková en sia prelego prezentis la agadon de la klubo dum ĝia historio. Poste Petr Chrdle prezentis novajn librojn de sia eldonejo kaj omaĝis al Jan Duda, kiu preparis du el la libroj kaj festas gravan vivjubileon. Medaliono de Jan Duda aperis ankaŭ en japana publikaĵo, kiun Petro transdonis al li. Sian ĉeĥlingvan libron pri esperantlingva agado Petro poste donacis al la urbestro.



Ankaŭ du klubaninoj festis siajn vivjubileojn, Marie Minářová kaj Libuše Dvořáková, kiuj ricevis bukedojn.



Jindřiška Drahotová per lumbildoj konatigis la ĉeestantojn kun siaj libroj, kiujn ŝi plejparte tradukas el Esperanto al la ĉeĥa, krom serio da legolibretoj, kiuj male aperas internacilingve. El ŝiaj tradukoj ni menciuj ekz. *Maŝkaráda kolem smrti*, *Robinsoni na Sibiři*, *Osm let na cestách po naší planetě* k.a.

Posttagmeze Petro Chrdle prelegis pri Komenio kaj Zamenhof, prelegon de malsana Mária Pilková pri historio de Esperanto en Slovakio prezentis Pavol Petřík, fine Jiří Tomeček montris, kiel aspektos la nove preparata retejo de la muzeo.



Vespero apartenis al la Instituto por Renaskiĝo de Kultura Heredaĵo en la koncerta salono. La 16-jara Damian Altior demonstris kulturon de teo per ceremonio, kiun li lernis de sia 4-a jaro.



Sekvis koncerto de ensemblo *La vojo de melodio*, nome Beata kaj Jiří Altior kun siaj kolegoj Vojtěch Frank, Tadeáš Průša, Ondřej Beneš, Jana Dynková kaj Antonín Pevala. Ili kantis muzikigitajn poemojn de Stanislav Schulhof, kantojn omaĝe al Odoriko, faman kanton de Ennio Morricone *I am revenos vi* aŭ *Vultavon* de Karel Hašler en traduko de Margit Turková kaj Tomáš Břicháček.



La dimanĉo estis dediĉita al Odoriko de Pordenone. Lian vivon priskribis en siaj prelegoj Jiří Altior kaj Vladimír Liščák, sinologo, membro de la ĉeĥa akademio de sciencoj, aŭtoro de libroj pri frato Odoriko kaj pri Silka vojo.



Reĝisoro Jan E. Svatoš faris filmon *Až zařve lev* (Kiam roaros leono), en kiu post sia morto renkontiĝas en Purgatorio la animoj de Přemysl Otakar la Dua (František Němec) kaj frato Odoriko (Igor Bareš) kaj ambaŭ rememoras pri siaj vivoj - la unua kiel militanta reĝo, la dua kiel migranta monaĥo, kiu piede trairis 20 mil mejlojn en orientaj landoj kaj instruis pri kristanismo. La filmo estis projekciita antaŭ la tagmanĝo.

Post la tagmanĝo la omaĝo al Odoriko estis daŭrigata per koncerto en la Preĝejo de Vizito ĉe la Virgulino Maria.

-mm-

KIEL PO-ŜTUP-UMAS „la afero ALTIOR“ (Riporto de praga klubano)

Mi partoprenis **La 90-jaran jubileon de la Esperanto-klubo en Svitavy** (8.9.-10.9.), kie la admirinda kolekto de Altior konvinkis nin, ke ĉiuj ĝiaj anoj estimas Esperanton. Certe danke al la estro Jiří Altior, kiu fariĝis serioze respondeca esperantisto.

La geedzoj A. (Jiří, Beata) direktas ankaŭ siajn infanojn por akcepti Esperanton serioze. La infanoj ne nur partoprenadas, sed aktivas – ilia filo Damian (16 j.) malfermis sabate ilian vesperan programon per „teo-ceremonio“, kiun li kultivas jam de sia eta infanaĝo.



La sabata vespero sonis per kantoj, ĉu ĉeĥaj, ĉu esperantaj. Elstara prezento de la muzikgrupo – la (bel)kanto, violono - Beata A. (profesia muzikistino), kaj aliaj (pardonu, ke mi ne mencias ilin nome!). Kante partoprenis ankaŭ ni, aŭskultantoj – ĉar ni havis en la manoj la tekstojn tradukitajn Esperanten. Nun mi elstarigu la ĉeĥajn tradukojn de Jiří A.!!!. Sed eble ankaŭ Esperantaj tradukoj de niaj klubanoj (Turková, Břicháček) ne sonas malbele – opiniu mem.

Ni rememorigu, ke dekomenca punkto estis la omaĝo de beata Odoriko. La

biografion de la monaĥo verkis Vladimír Liščák, ano de la Ĉeĥa akademio (danke al ĝi li doktoriĝis), kiu la volumon al ni prezentis. La unua paŝo estis farita je la 14-de januaro, la dua estis farita ĝuste en Svitavy. La akademiano mem havis prelegon pri la beata Odoriko; sed ne nur tion: ni eĉ spektis filmon, kiu estas kreita laŭ la menciita libro (la reĝisoro: Jan Eliáš Svatoš).

La jubileon pintis la „Himno omaĝe al beata Odoriko“ kiun ni ĝuis dum la koncerto, kiu okazis dimanĉe, je la 14-a, en la baroka preĝejo. Spirhaltiga prezento de koncertgrupoj el Prago (LA VOJO DE MELODIO – estro Stanislav Mistr, PRAŽSTÍ PĚVCI – estro Beata Altior). Admirinde klare kaj ĝuste sonis Esperanto el iliaj voĉoj!

Ni rememorigu la buntan programon (kaj laŭimage ĝuu ĝin):

1. Ludvík L. Zamenhof & Félicien Menu de Ménil: **La Espero**
2. Ján Valaštan-Dolinský & arr. Vojtěch Frank: **Ne iradu preter ni!**
3. Ján Valaštan-Dolinský & arr. Vojtěch Frank: **Estas ja domaĝe**
4. arr. Jan Fila: **Inclitum Patrem** (hymnus)
5. Vojtěch Frank: **Nokto** (premiero)
6. Jan Fila: **Himno omaĝe al beata Odoriko** (premiero)
7. John Williams & Antonín Pevala: **Schindler list**
8. arr. Vladimír & Ugodin Jan Fila: **Ani ma 'amin**
9. Leonard Bernstein: **Chichester psalms**
10. Stanislav Schulhof & Vojtěch Frank: **Nový duch se rodí po vší zemi**

Finfine la urbano de Svitavy Libor Dynka teknike faris ĉion, ke nia komuna evento restu konservita por la rememoro de historio. Dankon!

11.9.2023

Margit Turková



Karel Hašler (1879-1941)

VLTAVO, VLTAVO

Pod skálou, na níž stál Vyšehrad,
ku Praze valí se řeka.
Já bych se zeptal jí tolik rád,
co na mě ve světě čeká?

Nikdy se ničeho neleknu,
třeba jsem na světě rád,
na břehu pod skalou pokleknu,
budu se pokorně ptát:

Vltavo, Vltavo, vodičko hluboká,
pověz mi, co bude do dne a do roka,
pověz mi, co voda přinese,
pověz mi, co voda odnese?

Řekni mi, kolikrát země se otočí,
než český dragoun si na koně vyskočí.
Kdy z noci odejde ošklivý sen,
Kdy se zas rozbřeskne den

Vltava mlčí, nic neříká,
jen její voda se kalí,
od jihu k severu uniká
kolem té vysoké skály.

Široce rozpíná ramena
Vltavy mohutný proud.
Skála je tvrdá a kamenná,
kdo v světě chtěl by s ní hnout.

Vltavo, Vltavo | Vultavo, Vultavo
Karel Hašler (1879-1941)
do esperanta přeložili Margit Turková a Tomáš Břicháček



1. Podská - lou, na níž stál Vy - še - hrad, ku Pra - ze
2. Sub ro - ko de re - ĝa Vy - še - hrad, lar - ĝe - ga

va - li se ře - ka, já bych se ze - ptal jí to - lik rád,
flu - e - gas ri - ver' kor - pre - me de - man - dojn mi vo - kas:

co na mě ve svě - tě če - ká? Ni - kdy se
gvi - dos min tra l' vi - vo Es - per? Sur la bord'

Karel Hašler (1879-1941)

VULTAVO, VULTAVO

Sub roko de reĝa Vyšehrad
larĝega fluegas river'.
Korpreme demandojn mi vokas:
gvidos min tra l'vivo Esper'?

Sur la bord' kliniĝas humile,
fascinas Panoramo,
kuraĝon esprimas ĝentile,
koron plenigas Amo:

Vultavo, Vultavo, profunda rivero,
vi estas, Vultavo, vejno de l'Espero,
diru vi, kion vi alportos,
diru vi, kion vi forportos?

Kelkfoje dum jaroj la Tero turniĝos,
ĝis en la Patrujo Espero naskiĝos
Ĝis la nokta koŝmaro perdiĝos
Ĝis la Suno leviĝos

Vultavo fluas kaj silentas,
ne zorgas pri mia voko
desude norden ĝi eskapas
preter la altega roko.

Ĉiam al obstakloj rezistos
la river' de mia kor'.
La roko staros kaj rezistos,
neniu movos ĝin for'.

Esperantigis Margit Turková kaj Tomáš Břicháček

INSTITUT RENESANCE KULTURNÍHO DĚDICTVÍ
ve spolupráci s ČESKÝM ESPERANTSKÝM SVAZEM
NADAČNÍM FONDEM ALTIOR
MUZEEM ESPERANTA VE SVITAVÁCH
ČES & společnosti GOODTEA.EU
srdečně zvou na 90. VÝROČÍ ZALOŽENÍ KLUBU ESPERANTA VE SVITAVÁCH



JUBILEO de 90 jaroj
de ESPERANTO

Deka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

La 24-an de septembro 2023, la Akademio aprobis la 10-an Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro, kun 420 novaj radikoj kaj 832 novaj vortoj aŭ plurvortaj terminoj kaj iliaj difinoj.

La Universalan Vortaron verkis Zamenhof en 1894 kaj la unua mondkongreso en Bulonjo ĉe Maro en 1905 ĝin akceptis kiel parton de Fundamento de Esperanto (1800 vortradikoj).

Ekde tiu tempo la Akademio akceptis naŭ oficialajn aldonojn, per kiuj ĝi oficialigis vortojn ĝenerale uzatajn, kvankam neoficialaj.

En PIV estas la oficialaj (fundamentaj) vortoj signitaj per asterisko (steleto) kaj oficialigitaj per numero de la oficiala aldono. La neoficialaj vortoj devenantaj el la verkoj de Zamenhof havas signon Z. Ekzemple:

***famili/o** (oficiala vorto Fundamenta)
familiar²a (oficialigita per 2-a aldono)
falt/o^Z (neoficiala zamenhofismo)
fantast/o (neoficiala vorto)

Al neoficialaj vortoj apartenis ĝis nun plejparto de etnaj kaj geografiaj nomoj (ekz. *bohemo*, *ĉeĥo*, *slovako*, *Prago*, *Bratislavo*), sed ĉar esperantistoj kutime komencas sian konatiĝon per prezento de sia naskiĝlando kaj urbo de loĝado, la nova aldono koncentriĝas al oficialigo de tiuj nomoj.

Landoj kutime ricevas sian nomon laŭ sia majoritata nacio per aldono de **-ujo**, **-io** aŭ **-lando** (*Ĉeĥujo*, *Ĉeĥio*, *Ĉeĥlando*). La sufikso **-io** restas neoficialigita, kvankam ĝi estas plej multe uzata. Alinacianoj vivantaj nialande estas *ĉeĥujanoj*, *ĉeĥianoj* aŭ *ĉeĥlandanoj*, se ili ne sentas sin *ĉeĥoj*, sed ekz. *poloj*, *germanoj*, *judoj*, *hungaroj* k.s.

Civitanoj de kontinentoj, landoj kaj urboj deriviĝas per la sufikso **-ano** (*eŭropano*, *kanadano*, *parizano*) kaj estas skribataj minuskle same kiel etnoj (*anglo*, *franco* ktp.), ĉar en Esperanto ili ne estas konsiderataj propraj nomoj.

Ekzistas kelkaj radikvortoj, kiuj komence eniris nian lingvon kiel landonomoj (*Egipto*, *Koreo*, *Vjetnamo*, *Ukraino*) kaj la etnonomoj estis derivitaj (*egiptano*, *koreano*, *vjetnamano*, *ukrainano*), sed nun ili estas konsiderataj kiel etnonomoj (*egipto*, *koreo*, *vjetnamo*, *ukraino*) kaj derivitaj estas la landonomoj (*Egiptujo*, *Koreujo*, *Vjetnamujo*, *Ukrainujo*).

Ĉe kelkaj geografiaj nomoj konkurenco pluraj variantoj, tiujn la nova aldono unuecigas: **Losanĝeleso**, **Riodeĵaneiro**, **Sanfrancisko**, **Telavivo** (anstataŭ *Los-Anĝeleso*, *Rio-de-Janeiro*, *SanFrancisko*, *Tel-Avivo*, kiuj troveblas en PIV). Male lasas formojn kiel Centr-Afriko, Ebur-Bordo, Mez-Eŭropo, Nov-Jorko.

En la listo de la oficialigitaj vortoj estas ankaŭ difinoj, ekz.

bohem/o. Ano de Bohemujo. **Bohem/uj/o.** Okcidenta parto de Ĉeĥujo, iama reĝlando.

ĉeĥ/o. 1 Ano de la ĉefgento de Ĉeĥujo, parolanta okcidentslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: ces). 2 Ano de Ĉeĥujo. **Ĉeĥ/uj/o.** Lando en Mez-Eŭropo, inter Aŭstrujo kaj Pollando. Internacia landokodaĵo: CZ. **ĉeĥ/a.** Rilata al ĉeĥoj, la ĉeĥa lingvo aŭ Ĉeĥujo.

Prag/o. La ĉefurbo de Ĉeĥujo, kaj antaŭe de Bohemujo kaj de Ĉeĥoslovakujo.


Bedaŭrinde la listo estas tro longa por publikigi ĝin en Starto, sed ĝi estas elŝutebla ĉe la retejo de la akademio:

<http://www.akademio-de-esperanto.org/>

Ankaŭ ĉi-jare KAVA-PECH ne pigras

Ekde la komenco de ĉi tiu jaro la eldonejo KAVA-PECH eldonis jenajn librojn en Esperanto aŭ ligita al Esperanto:


La jam anoncita eldono de ***Sadako volas vivi!***, verkita de Karl Bruckner en



perfekta traduko de Jan Duda finfine aperis. La vorto *finfine* taŭgas, ĉar estis problemoj kun la akiro de la kopirajto, kiun ni tamen sukcesis venki. Temas pri romanstile prilaborita

vera okazado de japana knabino Sadako Sasaki, kiu transvivis la atombombadon de Hiroŝimo sen videblaj vundoj, tamen post 9 jaroj ŝi mortis pro leŭkemio, malsano kaŭzita de radiado.

Bluaj neĝoj de Piotr Bednarski en traduko de Ewa Grochowska estas plia




ero en la vico de la kontraŭmilitaj libroj de KAVA-PECH. Temas pri aŭtobiografiaj rakontoj de travivaĵoj de la aŭtoro, nun fama pola verkisto, tiam juna knabo, kiu estis dum la dua mondmilito de-

portita kun la gepatroj al Siberio. Li ĝisvivis la liberecon preskaŭ mirakle, la sola el la tuta familio. La titolo rilatas al la koloro de la neĝo dum temperaturo de minus 40 gradoj de Celsio.


La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj estas finalistaj noveloj

de la Interkultura Konkursuro. La kolekto prezentas la rezulton de la konkurso: 37 finalistajn novelojn elektitajn inter 421 konkursaĵoj. Ĉiuj estas prezentitaj en Esperanto kaj ankaŭ en la originala lingvo tiuj, kiuj ne estas verkitaj en Esperanto (franca, itala, rusa, ukraina).




Ekster la limoj. Apokrifoj estas la

apokrifaj kristnaskaj rakontoj, kiuj ne eniris en la Bibliion. Ĉiujn tradukis Gerrit Berveling. Fine estas envicigita riĉa bibliografio de Berveling, kaj liaj verkoj, kaj tradukaĵoj.



En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj verkita de Jan Duda estas bazita sur la

prelego de la aŭtoro prezentita dum la UK en Prago en la jaro 1996. Ĝi koncize, sed trafe resumas la evoluon de muziko en Ĉeĥio kune kun priskribo de elstaraj ĉeĥaj komponistoj fronte de Smetana, Dvořák, Janáček kaj aliaj. Kiel titolon la aŭtoro elektis citaĵon de la komponisto Bedřich Smetana.



Fine mi prezentas ankaŭ proprajn librojn, ĉe kiuj mi estas ne nur eldonisto, sed ankaŭ aŭtoro. En ili mi resumas mian ĝisnunan poresperantan kaj per-esperantan laboron. Ambaŭ enhavas multajn nigroblankajn fotografaĵojn.


Mia vivo kun Esperanto enhavas kvar partojn: A, kiu priskribas mian Esperantan karieron kiel funkciulo de pluraj Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ



kiel ĝia profesia utiliganto. Ĝi montras kaj seriozajn, kaj gajajn rememorojn, ofte lernigajn. Parto B konsistas el elektitaj fragmentoj el miaj verkoj kaj diversaj artikoloj en Esperanto-gazetaro. Parto C montras

bibliografion rilatantan al Esperanto kaj parto D specimenojn de la oferto de mia eldonejo.

Život s esperantem (Vivo kun Esperanto) celas la neesperantan publikon, tial ne temas pri Esperanto-verzio de la



antaŭa, sed tute diferenca libro, kvankam preskaŭ ĉiuj bildoj estas la samaj. Ĝi enhavas tri partojn kaj kvar aldonaĵojn. Parto A estas laŭstrukture la sama kiel tiu en Esperanto, tamen la teksto estas kongruigita al la

celgrupo de legantoj. La parto B enhavas pli frue aperigitajn artikolojn rilatantajn al Esperanto en la ĉeĥaj periodaĵoj (unu en la slovaka), la parto C specimenojn de la eldonita literaturo. Aldonaĵojn kreas

unue Kompleta gramatiko de Esperanto laŭ Henri-Sébastien Erhard en traduko de Dagmar Chvátalová kaj Marek Blahuš, due kelkaj esprimoj en Esperanto kun la ĉeĥaj tradukoj, trie Akademio de Esperanto (priskribo de ties taskoj) kaj kvare Rekomenditaj interretaj portaloj por pliaj informoj.

Mi venos kvazaŭ la morto estas ĝuste



nun aperanta poemaro de juna talentita kosova poetino Donika Dabishevci en la traduko de Bardhyl Adam Selimi. La aŭtorino estas apreciata de kritikistoj kiel la plej potenca virina voĉo de la lastaj jardekoj. En ĉi tiu

verko de erotikaj poemoj ŝi kantas pri la amo: la amo kiel viva celo, kiel travivaĵo, kiel stato, kiel sperto, kiel legitimigo de la vivo mem, de nia ekzisto. Ŝia virino estas soifa kaj malsata por la amo, virino, kiu allogas, estas decidema ricevi tion, kion ŝi volas, rabia, arde brulanta en la amoro, kiu post la plenumiĝo de sia dominanteco povas forlasi vin. Tial la sindoniĝo al la amora sovaĝa pasio laŭ la virino en ĉi tiuj poemoj estas neevitebla. Ĝi venas kvazaŭ la morto kaj neniel vi povas eskapi de ĝi. Do, ĝi venkas!

Petro Chrdle
chrdle@kava-pech.cz

Pli da informoj vi trovas en la retejo
<https://kava-pech.cz>.

La tago de eŭropaj lingvoj

La tagon de eŭropaj lingvoj (26.9.) ni ĉi-jare festis en elementa Masaryk-lernejo en Morašice. Sinjorino instruistino Renzová organizis interparolon pri Esperanto por 80 lernantoj, kiuj estis dividitaj en du grupojn. Libuše Dvořáková konatigis al la infanoj la kreinton de Esperanto Ludovikon Lazaron Zamenhof, liajn motivojn por krei la internacian lingvon kaj lian vivon kaj verkon.



La infanoj eksciis ankaŭ pri la aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto nialande, František Vladimír Lorenc, kaj pri lia vivo. Ili admiris lian scion de lingvoj. Al la infanoj plaĉis la vortfarado, la facileco de Esperanto.



Plie ili sciĝis pri unuopaj organizoj kaj aranĝoj en Esperanto-movado, pri ebloj partopreni en kursoj aŭ lerni ĝin aŭtodidakte. Iliajn intereson vekis prezentado de la teatro DOMA en la mondkongresoj de Esperanto kaj kiel la kongresoj funkcias, kiel facile eblas ligi amikecon kun amikoj de la tuta mondo. Ili petis demonstri kiel la lingvo sonas kaj sinjorino instruistino Hana Vanišová petis sendi al ŝi kelkajn kantojn en Esperanto.

Libuše Dvořáková



La klubo en Svitavy eldonis bildkarton okaze de 90 jaroj de Esperanto en Svitavy kaj 15 jaroj post fondo de la muzeo.

Kunlaboro kun Asocio Brontosaurus

La 17-an de oktobro 2023 prelegis en la muzeo Josef Gajdoš pri Aŭstrio kaj la 31-an de oktobro Libor Lněnička pri regionoj de Teplice kaj Most (ĉeĥe). Decembre okazos prelegoj pri Aŭstrio kaj Suda Koreujo.



Lanĉo de nova libro



Je la 23-a de oktobro okazis „bapto“ de la libro de Lucien A. Peraire „Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto“, tradukita al ĉeĥa lingvo de Jindřiška Drahotová. La solenaĵo okazis en „Klementinka“ sur strato *Třída Václava Klementa* en *Mladá Boleslav*. La libron prezentis esperanta rondeto „Klementinka“ al publiko. Anoj legis partetojn el la libro kaj aldonadis informojn kaj fotojn pri samtempaj siaj korespondantoj, loĝantaj en lokoj, kie antaŭ 90 jaroj veturis franca biciklisto kaj prezentis foton. La libron baptis direktorino de loka Urba biblioteko.



Interesatoj povas peti libron „Evropou a Asií na kole a s esperantem“ en bitformo de J. Drahotová.

Jindřiška Drahotová

<http://www.mlboleslav.cz/esperanto/>

E-mental' 25-jara

La klubo E-mental' estis fondita la 5-an de marto 1998 sub labornomo Flakso-klubo. La 7-an de aprilo 1998 ĝi akceptis ŝercan nomon *E-mental'*, klubo por esperantistoj mense handikapitaj.

Ekde tiu tempo la klubo organizis multajn aranĝojn kun ŝerca, propaganda aŭ karitata temo. Ekzemple kuradon por Paraple, Briko, Paralela universo. Eble la plej granda sukceso estis, ke honoran membrecon akceptis Zdeněk Svěrák.

Ankaŭ ĉi-jare la klubo daŭrigis sian agadon.



En la retejo <http://www.e-mental.cz/> la interesatoj trovos pliajn informojn.

81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo

12. – 15. 10. 2023

Okazis en la tre bela andaluza urbo Sevilo, nomata perlo de Andaluzio. Post Madrido, Barcelono kaj Valencio ĝi estas la kvara plej granda urbo en la lando. Trafluas ĝin la rivero Guadalquivir. Sevilo famas pro flamenko-danco, taŭro-bataloj kaj aliaj tradiciaj festoj. La katedralo de Sevilo estas la tria plej granda en Eŭropo. Imponas ankaŭ la reĝpalaco *Alcázar*, unu el la plej antikva en Eŭropo kaj la plej bela en Hispanio. La majesta katedralo Sankta María 130 metrojn longa kaj 76 metrojn larĝa estas la kvara plej granda en la mondo. La ĉefplaco *Plaza de España* estas belega duoncirkla historia monumento. Alia simbola monumento estas la *Torre del Oro* (Ora Turo), en kiu troviĝas la muzeo pri maraĵoj. En Sevilo oni trovas monumentojn de romiaj, arabaj kaj eŭropaj stiloj, multajn parkojn, muzeojn kaj aliajn beliaĵojn. En la urbo moviĝas 99 ĉeval-ĉaroj por promenigi turistojn. Dum la kongreso ne estis multaj eblecoj vidi ĉion vidindan. La sabatan matenon esperantistoj povis viziti la Belartan muzeon. Ĉe la metroo-stacio *Puerta Jeréz* ekstere en la apuda pasejo estis instalita ekspozicio de pentraĵoj de famaj pentristoj el la muzeo de Prado.

La kongresa temo estis: **"Kompremo inter popoloj"**. Pri ĝi amplekse prelegis ĉe la fino de la kongreso la prezidanto de UEA Duncan Charters. Al la kongreso aliĝis pli ol cent kvindek geesperantistoj el pli ol dudek landoj. La kongreson partoprenis krom la prezidanto de UEA kun sia edzino ankaŭ la ĝenerala direktoro Martin Schäffer

kun sia familio. La kongreso okazis en la andaluza sidejo de UGT (ĝenerala unio de laboristoj).



Ĵaŭde, ekde la 10-a horo okazis akcepto de kongresanoj. Ni ricevis sakojn kun la kongresa materialo kaj intertempe oni povis trarigardi la libroservon instalitan en la enirejo. Poste okazis prezentado de la kongreso. Post la tagmanĝa paŭzo sekvis kunvenoj de la hispanaj E-asocioj kaj prezentado de la libro "125 años de Esperanto en Sevilla", (125 jaroj de Esperanto en Sevilo), kiun oni povis aĉeti surloke. En la vespero okazis festeno kun multaj manĝaĵetoj, dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj omaĝe al la 112-a datreveno de la fondiĝo de la esperantista grupo de Sevilo.

La inaŭguro okazis vendrede je la 10-a horo en la salono Zamenhof. La ĉeestaron alparolis salutante Antonio Rodríguez Gasch, José Roldán León (prezidanto de LKK), Ángel Arquillos (prezidanto de HEF), Duncan Charters (prezidanto de UEA), Laŭra Brazabenni (Itala Esperanto Federacio) kaj Rodica Todor (IFEF prezidantino). Sekvis salutoj de aliaj asocioj kaj muzika paŭzo. Poste ni povis spekti filmojn pri Esperanto en Tubaro. Unue Pablo Busto klarigis kiel akiri ilin.

Gabriela Manzano kun sia patro Viko prezentis kelkajn amuzaĵojn el "PIKA PIKA ESPERANTO". Aliloke okazis kurso por komencantoj. Sekvis prelego: "Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en Esperanto", "Instruado de Esperanto en la andaluza publika eduk-sistemo" al kiu alvenis kelkaj studentoj de la mezlernejo. Poste ni ĝuis teatraĵon "La akuzantivo aŭ la kazo pri malklera tatuisto" prezentita de la "Talenta Teatra Trupo". Sekvis prelego "Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco". Akompane de citero ni povis aŭskulti poeziaĵojn prezentitajn de Ana Manera kaj Ángel Arquillos. Pri la spaca programo Artemis kaj reveno al la Luno interese parolis Carlos Spinola. La lasta prelego mallongigita pro manko de tempo temis pri ĉinaj ideogramoj.

Sabate posttagmeze estis prezentita la teatraĵo "La gazetara konferenco" fare de la "Talenta Teatra Trupo". Aliloke okazis ateliero pri Esperanto. Sekvis prelegoj: "Minimumismo bonas" kaj "La bibliotekoj tra la historio". Vespere ni spektis pupateatron kaj grupo de bele vestitaj kastanjet-ludistinoj prezentis belan spektaklon en la ritmo de aldonita muziko.

Dimanĉe matene ni spektis la teatraĵon "La pomo de Adam". Poste okazis aŭkcio gvidata de Tonyo del Barrio. Sekvis prelego de Duncan Charters kaj la oficiala fermo de la kongreso. Dum tiuj tagoj regis varma (eĉ varmega) suna vetero, do multaj plene interesiĝis pri la kongresa programo. Oni povas konstati, ke la kongreso estis sukcesa kaj bon-etosa. Koran dankon al la organizantoj pro tiu agrabla evento.

Liba Gabalda

Internacia Seminario pri Sociaj Retoj kaj Homa Konduto

okazis en sevila universitato (fakultato pri filologio) kiel la hispana antaŭkongreso. La seminario estis organizita de "Civiencia" sub la gvido de la universitata profesoro pri psikologio Vicente Manzano Arrondo (kromnomo Viko), kiu sukcesis arigi plurajn universitatajn profesorojn de la mondo kaj aliajn gravajn personojn por prezentado de interesaj prelegoj. Ni povis aŭdi prelegantojn el Hispanio, Francio, Germanio, Italio, Irano, Japanio, Kostariko, Rusio, Serbio kaj Usono. Viko malfermis la seminarion kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Poste alparolis nin la UEA-prezidanto Duncan Charters. La seminario estis tre intensa, foje la tekniko misfunkciis, sed tamen ĉiuj prelegoj povis okazi ĉeeste aŭ virtuale. Dum la prelegoj okazis samtempa interpretado inter Esperanto kaj la hispana lingvo. Al la seminario venis ankaŭ kelkaj studentoj kiuj antaŭnelonge komencis lerni Esperanton. Dum la seminario estis pritraktataj diversaj interesaj temoj, sekvis debatoj, planado de projekto Erasmus Mundus kaj la jenaj konkludoj: Aperis ideoj por realigo de projektoj - informteknologia evoluo helpas al esperantistoj por plibonigi la movadon - neceso revivigi la sciencan revuon - teknoevoluo helpas, sed la homo gravas - lerni kiel instrui la lingvon kaj la sociajn retojn - utiligi sociajn retojn kaj AI-n (Artefarita Intelektio) por edukado kaj komunikado - profiti de la universitatoj - videbligi kaj realigi originalajn projektojn per Esperanto - ĉio, kio aperas en Esperanto estu fidinda.

Liba Gabalda

Milan Kundera....kaj Esperanto

eseo

Neniam realiĝos la kunvortigo "Milan Kundera **kaj** Esperanto" !

Tion ni konstatu, kelkajn monatojn post la morto de la aŭtoro (11.7. 2023), pri kiu parolas "la tuta mondo"...

Ne nur parolas... Liajn verkojn eĉ legas la tuta... , diras la statistiko, kiu kalkulas la lingvojn, en kiujn estis tradukitaj liaj verkoj (certe superas la 50-on). Sed Esperanto inter ili ne troviĝas! Kaj ne troviĝos almenaŭ ĝis validos la aŭtoraj rajtoj. Ĉu la kialo kuŝas en la ne-interesiĝo de esperantistoj?

Ne! Male! Jam antaŭ jaroj tradukis Jan Werner la eseo-volumeton "Můj Janáček" (*Mia Janáček*).

Mi povas imagi, kiel "avide" kaptis J.W. la verkon; li - la samurbano de M.K. (Brno), la samŝatanto de la komponisto Leoš Janáček, la muzikon, volis la grandulon prezenti al la internacia publiko, tra la verketo de Milan Kundera. Oni povas imagi la disreviĝon de Jan, kiam li ricevis jenan respondon rilate la publikigon: la eldonejo ATLANTIS (Brno) esprimis la reagon de la aŭtoro (pere de kontakto al Věra K., la edzino de M.K.) - ke "Esperanto ne estu lingvo, en kiun oni traduku la verkojn de M.K." Punkto!!

Kvankam kiel esperantistino mi sentas la saman seniluziiĝon, mi "fieras" (senmerite) esti samlandanino de M.K. Kaj mi interesiĝas pri liaj verkoj. Kaj min interesas ĵurnalistaj analizoj, kie troviĝas la kerno de lia verkista fameco. Traleginte liajn "romanojn" kaj fakajn opiniojn pri lia verkaro, mi faris la mian:

per la romano "Žert" (*La ŝerco*) li starigis la unuan kolumnon de sia mondfameco. La dua estas - "Můj Janáček"... Li altiris intereson al la fenomeno, kiu koncernas nian (lian) patrujon - Ĉeĥlandojn - multflanke. Mi dirus: la ĉeĥeco de Milan Kundera kaŭzis lian mondfamecon". Do, ĉu samlandanoj, ĉu esperantistoj ni estimu la famulon (kaj ĉefe legu lin).

Nun mi klarigos al la legantaro, kio instigis min skribi la artikolon. Ĉe la ĵurnalist-kampanjo post la morto de M.K. En la tag-gazeto PRÁVO mi trovis la artikolon sub la titolo: **"Kundera alvenadis inkognite, oni rememoras en Kunštát."** (Vidu la foton). Tuj oni komprenas, kial Milan elvokadis grandan intereson pri sia personeco: pro sia videbla vir-ĉarmeco kaj sentebila inteligenteco...



La kuzoj Kundera en Kunštát

La subtitolo vidigas al ni la kuzojn - do Milan-on kaj Ludvík-on Kundera (eble "Kunderoj"??) en la kvindekaj/sesdekaj jaroj de la 20a jarcento. La aŭtoroj de la artikolo en PRÁVO klarigas al ni la eventon: Milan alvojaĝis en Kunštát-on, por en la familia kabano travivi kelkajn tagojn, en trankvila medio. "Bonvenigis lin nia patro", diras la aŭtoroj - **Jan Kundera kaj Alena Vašková Vlčková.**

Do, ni vidas, ke en la familio Kundera troviĝis Ludvík - tiam jam fama verkisto, tradukisto el la germana (precipe de Bertolt Brecht), poeto. Kaj en tiu ĉi punkto mi povas eldiri miajn rememorojn: ja la verkisto Ludvík K. estis konata al mi delonge – ĉar Jiří Karen (la esperantisto el Prago) ofte parolis pri Ludvík, sia amiko kaj kolego; pri vizitado (kun Zuzana, la edzino) en Kunštát, en la familio Kundera, kie oni ĝuis ne nur kreivan medion, sed ankaŭ la pomojn el la ĝardeno de la familio (ni imagu, kiel Milan en la kabaneto verkas sian faman romanon "Žert"). Sub varmo de la rememoroj mi tuj skribis al la gefratoj Jan kaj Alena, kiuj sincere reagis, freŝe rememorante la vizitadojn de Karen-oj, esprimante subtenon al Esperanto. Mi aldonu ankoraŭ unu rememoraĵon: antaŭ kelkaj jaroj okazis konferenco de AEH (sub organizado de Jarmila Rýznarová, kaj pardubice-anoj) en la ripozloko Hodonín ĉe Kunštát. Tiam mi veturis al la urbo, por vidi la domon, kiu apartenis al la poeto František Halas - poste al la familio Kundera. La anonctableton sur la domo mi trovis...


*Margit Turková, novembro 2023
Laŭ ĵurnalo Právo*

Virtuala kongreso 2023

UEA venis kun novaĵo - tri monatojn post UK en Torino ĝi eksperimente provis fari virtualan kongreson en la tagoj 23 - 26 novembro 2023. Por individuaj membroj de UEA ĝi estis senpage, sed ili devis registriĝi ĝustatempe por ricevisian pasvorton.



Post eniro en la virtualan kongreson, la vizitanto vidis supervidon de programeroj, ĉe kiuj estis skribite *pasinta - nun - venonta* laŭ tio, ĉu la programero jam okazis, ĝuste okazas aŭ nur okazos. Kiam vi elektis iun temon, aperis dekstre afiŝo kun invito eniri la programeron kaj poste vi vidis kaj aŭdis la preleganton kaj lian prelegon kun tekstoj kaj bildoj.



Kelkaj el la programeroj okazis rekte en la momento de elsendo, aliaj estis antaŭregistritaj, ekz. el la vera UK Torino (solena inaŭguro, Ludoj kun diablo de la ensemblo DoMa el Svitavy, naturistoj ktp.). Se vi ne sukcesis vidi iun programeron, vi povis ĝin trovi en la arkivo.

La maldekstra menuo proponis: *Gravaj anoncoj, Plena programo, Vidbabilejoj, Kafeto, Koridoro, Drinkejo, Tekstbabilejoj, Regularo, Instrukcioj, Pri la evento.*
-mm-

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO (INK):

4-A ELDONO LANĈITA KUN NOVA TEMO

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) alvenas kun nova temo: **Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*.**

La kvara eldono de la konkurso estis lanĉita dum la oktobra Retoso kaj estas rezulto de daŭra kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aldone aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses diversaj lingvoj: krom Esperanto, eblas konkursi en la itala, la kataluna, la persa, la rusa kaj la ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.

Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro 4500 eŭroj. La prezidanto de la konkurso estas irana esperantisto Ahmad Mamduhi, kiu estas ankaŭ prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menciiti en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 110-a Universala Kongreso de UEA en 2025. En la komen-

canta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de junio 2024.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la tria eldono, kies temo estis *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3-a aŭgusto – 10-a aŭgusto 2024). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongreso/alighilo.

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj eldonoj de la konkurso estas aĉeteblaj en la [Libroservo de UEA](#) (*Amo, tuso kaj forpaso* kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*, ankaŭ ĉe [eldonejo KAVA-PECH](#)).

laŭ Gazetaraj Komunikoj n-ro 1143

Klarigoj:

■ **Akademio Literatura de Esperanto (ALE)** naskiĝis julie 2008 por daŭrigi la laboron de la iama *Esperantlingva Verkista Asocio (EVA)*.

■ **Bobelarto** estas iniciato por subteni literaturon en Esperanto fondita de teamo de entuziasmaj homoj pri nuntempa literaturo en Esperanto.

■ **Retoso** estas virtuala renkontiĝo (reta etoso) de TEJO.

PARTOPRENU EN BELARTAJ KONKURSOJ

Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ divers-persona): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. La unua premio nomiĝas *Premio María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2023. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31a de marto 2024**.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al unu el jenaj adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com;

bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coterios 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro.

Laŭ Gazetara Komunikado n-ro 1126

PRELEGU EN IKU 2024 EN ARUŜO

Eblas ankaŭ **virtuale per Zoom**, kvankam ĉeestaj prelegoj estas preferataj.

Kadre de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, okazos la 77-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). Proponoj por IKU-prelegoj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la **31-an de januaro 2024**.

Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Scienca Kafejo (SK). Vi povas samtempe proponi **AIS-kurson**, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Eblas ankaŭ proponi **nur por la SK**, kiu konsistas el pli mallonga (ĉ. duonhora), pli popularnivela prelego. **Bonvolu indiki**, ĉu via propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso, aŭ nur por la SK.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan **resumon** de la prelego kaj koncizan **biografieton** de la preleganto, **ĉiu de amplekso de proksimume kvin linioj**. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la SK. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo (<https://uk.esperanto.net/2024/>).

Akceptita IKU-prelego estos rekom-pencita per **honorario de 240 EUR**. Por IKU-AIS-kurso la honorario estos 300 EUR kaj por Scienca Kafejo – 120 EUR.

Daŭre aĉetebblas **IKU-libro 2023** ĉe Libroservo de UEA.

Laŭ Gazetara Komunikado n-ro 1134

PREMIO GRABOWSKI 2023 ALJUĜITA DUM LA 4-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

En la fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 26-an de novembro 2023, estis anoncita la ĉi-jara Premio Grabowski.

La unua (kaj sola) premio (800 usonaj dolaroj) iras al la eldona teamo de *Militrakonto*, nome Javier Alcalde (Hispanio), Pascal Dubourg Glatigny (Francio), Catherine Gousseff (Francio) kaj Ulrich Lins (Germanio). La kvar laŭreatoj ricevas la premion pro siaj elstaraj kontribuoj al la scienca studo de la historio kaj kulturo de la Esperanto-movado kun aparta enfokusigo de la tutmondaj konfliktoj en la 20-a jarcento, temo al kiu ĉiuj el ili kontribuis unuope kaj kune. Aparta kristaliĝo de tiu kolektiva agado estas ĝuste *Militrakonto*, kiu estas ambicia esplorprojekto pri la transnacia imagaro de la dua mondmilito (en plej larĝa senco), vidata tra la optiko de Esperant-lingvaj fontoj. En tiu kadro estis iniciatita la retejo, kie regule aperas kontribuadoj kaj novaĵoj de la internacia esplorgrupo, kiun gvidas la laŭreatoj.

<https://mondmilito.hypotheses.org>



Vizito en Győr

Dum la novembra *longa* semajnfino vizitis E-mentalanoj hungaran banlokon Győr. Grupo de dek samideanoj ĝuis



belan historian urbon je kunfluo de riveroj Rába kaj Mosoni Duna (brako de Danubo) kaj ĝian termikajn banejojn. Ĉar en najbara Slovakio kaj Ĉeĥio ĝuste okazis ŝtatfesto de la 17-a de novembro, la urbo kaj

banloko estis plena de ĉeĥoj kaj slovakoj. Sed esperantistoj ĉie amikojn havas, do ankaŭ E-mentalanoj trovis eblecon kunsidiĝi kun hungaraj esperantistoj. Sabaton ni dediĉis je trarigardo de la urbo, ĝiaj preĝejoj kaj memoraĵoj.



Jiří Tomeček

Jarkunveno de ĈeFEA

20.11.2023 okazis en Prago jarkunveno de Esperantistoj-fervojistoj. Kiel kutime en la urbo gastigis nin domo Bohemika, kiun posedas kaj havas ĉi tie sidlokon Sindikata Unio de Fervojistoj. Kun la sindikata organizo ni ofte kunlaboras kaj dank' al tio vizitis nian kunvenon ĝiaj reprezentantoj, kiuj ne nur salutis nin, sed ankaŭ informis niajn membrojn pri aliaj eblecoj de nia kunlaboro.

Poste ni informis membraron pri agado dum lasta jaro, pri financaj kaj internaj aferoj kaj pri agado de IFEF. Raportis ankaŭ kunlaborantoj de Faka kaj Terminara komisionoj. El niaj aranĝoj en la jaro 2023, kiujn ni preparis, estis la plej sukcesa seminario "Eŭropaj fervojoj", okazinta ĉe Universitato Pardubice. Krom tio bona afero estas, ke nia asocio ricevis eblecon uzadi unu ĉambron en la stacidomo Choceň, do niaj membroj dum jarkunveno eksciis pri ekipado de la loko, kiu servos por ni ĉefe kiel arĥivo kaj malgranda kunvenejo.

Sekvis informoj kaj prezentado de IFEF-kongreso en Ŝtrasburgo, kiu okazos majo kune kun Eŭropa kongreso de Esperanto.

Post paŭzo okazis prelegoj pri estinta IFEF-kongreso en Antverpeno kaj postkongreso en Charleroi. Dua prelego estis pri nia konferenco okazinta aŭtune nekutime en greka urbo Leptokaria.

Ni esperas, ke agado de la lasta jaro plaĉis ne nur al niaj membroj, kaj ni esperas, ke la venonta jaro estos simile sukcesa.

Ladislav Hakl

**ČŽES-Český železničářský esperantský
svaz z.s.**

*ĈeFEA-Ĉeĥa fervojista Esperanto asocio
r.a.*

Slovo předsedy

Nový výbor Svazu, zvolený na loňském kongresu v Pardubicích, má za sebou rok práce. Výsledky jste mohli posoudit na zářijové konferenci v Prudké. O průběhu konference a jejích závěrech se píše na dalších stránkách tohoto STARTA.

Pravdou je, že se nám podmínky práce mění přímo pod rukama. Je čím dál tím složitější rok předem zajistit termín, místo a především cenové podmínky ve vybrané lokalitě. Na naše kongresy a konference ještě zdaleka nejezdí všichni ti, kteří se účastnili v minulosti. Ať z důvodů věku, zdravotního stavu, finančních možností či obav z přetrvávajícího covidu. V takových podmínkách musíme i my často měnit plány a termíny.

Chceme naše akce organizovat tak, aby vyhovovaly co největšímu počtu členů. Na konferenci v Prudké jsme proto připravili krátkou anketu, jak dlouhé by takové setkání mělo být, jaké místo preferujete a co byste uvítali v doprovodném programu konference. Nevýhodou dotazníku na konferenci bylo to, že odpovídali lidé, kteří se zúčastnili. Nezazněla tu ale negativa, kvůli kterým někteří členové nepřijeli. Rozhodli jsme se proto anketu zopakovat a zeptat se vás všech mailem.

Ano, mailem. Je to v tuto chvíli nejlacinější způsob, jak oslovit členskou základnu. Samozřejmě uvítáme, pokud nám někdo dá své připomínky k organizování konferencí a kongresů písemně. Ale v současnosti je elektronická komunikace asi nejběžnější a nejefektivnější. I jednání výboru jsou v tomto volebním období online. Šetří to peníze i čas a umožňuje nám to mít zasedání prakticky každý měsíc.

Vážení členové a čtenáři STARTA, přeji vám krásný advent, klidné prožití svátků vánočních a úspěšný START do nového roku.

Mgr. Ing. Jiří Tomeček, předseda

Jak překládati pro zpěv?

JUDr. Josef Fousek, Přelouč.
Esperantista, 1948, p. 845

Jest těžko vysvětlitelné, proč esperantisté-začátečníci zkoušejí obyčejně svoji dovednost hned na překládání básní a národních písní, tudíž na nejobtížnějším poli tvůrčím. Ještě neovládají dobře prózu, ale již vstupují na nejvyšší místa Parnasu, skládajíce básně. Není to však tak snadné a ještě nesnadnější jest dosíci, aby překlad odpovídal také hudbě, když překládáme písně nebo árie. Hudba má totiž svůj vlastní rytmus a přízvuk, který se musí shodovati s přízvukem v textu. Jest pravdou, že i naši přední skladatelé hudební chybovali proti české deklamací a přízvuku. Tím obtížnější jest pro nehudebníka překládati písně a árie tak, aby se tu neprohřešil.

Na přání vyslovené Svazem esperantistů ČSR uvolil se podepsaný prohlédnouti a posouditi po těchto stránkách překlady textů zhudebněných a sděliti autorům svůj názor a své připomínky, pokud mu zašlou svoje esperantské texty pro zpěv k posouzení. Jedná se také o to, aby tato překladatelská činnost na poli hudebním byla soustředěna pro evidenci o tom, co již bylo přeloženo, na které originální esperantské texty bylo již komponováno, a tak dále.

Asi před 28 lety vydal časopis "La Progreso" v Plzni velmi dobrý pochod "Nur antaŭen!" (*Esperantista marŝo dediĉita al la XIII-a Esperantista Kongreso, komponita de Jos. Horák, Plzeň, al la vortoj de Dro St. Schulhof, Pardubice.*) Celá báseň Dra Schulhofa jest v esperantu, v němž byla originálně napsána, správně deklamována. Počáteční slova

však hudební skladatel (nikoli autor) nesprávně hudebně akcentuje: **antaŭen** místo **antaŭen**. Tomu by se dalo snadno odpomoci, kdyby na prvou dobu taktu dal skladatel dvě osminové noty a na druhou dobu jednu čtvrtovou notu. Tím by také hudební přízvuk přešel na přízvukovou druhou dobu a melodický rytmus by se nijak neporušil, takže hudební přízvuk by souhlasil s jazykovým. (. . --, . . -- místo - . . -, - . . -).

Známý jest výrok světového dirigenta, že v hudbě jest hlavní věcí předně rytmus, za druhé rytmus a za třetí rytmus. To platí však nejen o hudbě, nýbrž i o každém jazyku. Tu jest pak hlavním činitelem přízvuk. Tomu jest tak i v esperantu. Zamenhof byl si toho ve své genialitě dobře vědom a proto v úplné gramatice esperanta mezi 16 pravidly nalézáme pod č. 10. větu: "La akcento estas **ĉiam** sur la antaŭlasta silabo." Jest to podobné pravidlo jako v polštině a převážně i v italštině. Zapněte si v radiu italskou stanici a poznáte, jak hlasatelé výrazně akcentují a jak jest tato řeč libozvukná. Jest to řeč původu románského, jako z větší části esperanto, a proto i ono působí tak libým dojmem při správné deklamací.

Báseň a píseň jest nejvyšším útvarem projevu každého jazyka. A esperanto nemusí se obávati konkurence s přirozenými jazyky v tomto směru, neboť se vyrovná nejhudebnějším jazykům živým, jakými jsou italština a španělština. Velmi poučný jest v tom směru v 2. čísle našeho listu úvodní článek „Verŝe v esperantu" od Dra Stan. Kamarýta, který tu poukazuje na přednosti esperanta proti návrhu Basic English.

V témže čísle jest i několik básní originálních a přeložených. Jest tu přeložena Hálkova báseň "Kdo v zlaté struny zahrát zná". Jest rytmicky i přízvukně zcela správná. Avšak proti originálu vykazuje v každém verši o slabiku více, takže není možno na tento jinak správný a výstižný překlad zpívat Smetanovo zhudebnění českého originálu z „Večerních písní". Naproti tomu překlad národní písně "Hořela lípa" v témže čísle uveřejněný bude se zpívat velmi dobře. Tamže uvedená originální báseň "Amara rerigardo" má charakter jambický, a přece třetí sloka (verš 2.) snad by mohla rytmicky lépe znít: "ĉi tie taksis en ĉi tiu mondo" místo "taksis ..."

Jak nepřirozeně ba až komicky se jeví nesprávné použití přízvuku v písni, vysvitne na př. když bychom v esperantské hymně "La espero" hned na počátku vynechali člen „la“ a zpívali k notám melodie o tuto slabiku méně: **En mondon** venis nova sento. Jak by naše ucho bylo uráženo! Jest to něco podobného, jako když vojáci ve vojenském vysílání rozhlasu dostávají za úkol zpívat na př. "Sil jsem proso" na slova "Nešťastný šafářův dvoreček" a pod. Z těchto, snad drastických, ukázek jest nejlépe patrna důležitost souladu rytmu slovního a hudebního.

V hudbě jest přízvuk rozdílný dle toho, zda se jedná o takt lichý (na př. valčíkový) či sudý (na př. polkový). Zpěvák musí míti požitky nejen z krásné melodie, nýbrž i z přiléhavého a zpěvného textu. Ovšem i pro posluchače jest příjemnější lahodná shoda a harmonie textu s hudbou a bylo by tu největší estetickou překážkou, kdyby rytmus hudební se nesrovnával s hudbou řeči.

Ježto podepsaný jest stoupencem esperanta již přes 40 roků a pěstovatelem hudby a zpěvu již přes 50 roků, domnívá se, že by mohl svých zkušeností použití ve prospěch našich překladatelů a básníků textů, jež souvisí se zpěvem, a jest ochoten býti nápomocen radou ku zdaru esperantské hudební tvorby. Jest třeba jen k zásilce připojit dostatečné poštovní známky na odpověď.

Ĉasopis Esperantista, 1948, str. 85

Signifa vivjubileo

Januare 2024, en daŭra, senfina freŝeco, festas sian 90-jariĝon klubano de EK Benešov s-ino **Jaroslava Hamajdová**.

Pri Esperanto ŝi eksciis de iu ĵurnalo en la jaro 1979 kaj de tiu tempo ŝi iĝis diligenta lernantino kaj post ekrego de la lingvo entuziasma propagandistino de Esperanto. Kun sia filo Petro ŝi vizitadis la SETojn en Lančov. Preskaŭ ĉiun duan monaton ŝi kompilis artikolon pri Esperanto por gazetoj de Benešov, Kutná Hora, sia hejmurbo Zruč nad Sázavou, aranĝis murgazetojn kun informoj pri Esperanto, partoprenadis E-kunvenojn, konferencojn, prelegis ankaŭ en praga teatro „Vivo 90“.

Ŝi estas sperta iniciatintino kun multaj bonaj ideoj. Ankaŭ siajn nepojn ŝi instigas por lerni Esperanton. Ĉu ni havos novajn junajn esperantistojn?

Nuntempe ŝi kompreneble ne plu povas viziti la klubon, ĉar la vojaĝo de Zruč nad Sázavou al Benešov estus ekskurso por preskaŭ tuta tago.

Almenaŭ tiamaniere ni elkore gratulas al Slávka okaze de ŝia naskiĝtago, dezirante sanon, feliĉon, ĝojon ĉiutage.

Sincere Leonarda Chaloupková



JUBILEANTOJ DE OKTOBRO, NOVEMBRO KAJ DECEMBRO 2023

Stanislava Boudová, Slabčice
Ing. Petr Deák MBA, Teplice
Jindřiška Drahotová, Mladá Boleslav
Blanka Faltýnová, Předměřice nad Labem
Eva Huderová, Světlá nad Sázavou
Petr Kastely, Týnec nad Sázavou
Marie Klimentová, Brno
Josef Krejčí, Bludov
Miroslav Malovec, Brno
MUDr Pavel Páral, Ústí nad Labem
Ing. Hana Preclíková, Hlinné
Pavla Rábllová, Ostrava
Milena Ronneforsová, Náchod
Marie Rytířová, Tábor
PhDr Ing. Irena Srkalová, Opava
Ing. Stanislava Straková, Litvínov
Rudolf Šindler, Libhošť
MUDr Elmíra Škáchová, Benešov
Ferdinand Štěpánek, Šumperk
Zdena Tesnerová, Pardubice
Ing. PhD. Josef Vojáček, Brno
Ing. Zdeněk Znamínko, Praha
Jiří Žák, Třebíč

JINDŘIŠKA DRAHOTOVÁ

Ŝi naskiĝis la 25-an de novembro 1938 kiel Hegrová, laboris kiel ĉefa flegistino en hospitalo de Mladá Boleslav.



Esperanton ŝi ellernis en 1990, kunlaboris kun Josef Vaněček, d-ro Josef Hradil kaj nun kun Miroslav Vaněk. Komune ili preparis kaj eldonis serion da Legolibretoj. Sed plej grava parto de ŝia laboro estas tradukado de esperantlingvaj verkoj en la ĉeĥan, kelkaj libroforme (*Asií a Evropou na kole a s eperantem*, *Osm let na cestách po naší planetě*, *Maškaráda kolem smrti*,

Robinsoni na Sibiři, *Člověk proti Babylonu*, *Africká mise*, *Zápisky z Iránu*, *No fakt, věřte mi, paní*), aliaj nur en bit-formo (*Nebezpečný jazyk*, *Chromozony vraha*, *Pohádky ze všech koutů světa*, *Srdce se zelenou hvězdou*, *Potomci impéria*, *Novely*, *Paměti Vladimíra Samodaje*, *Král Mates I. reformátor*, *Život Andree Cseha*).

Ŝi organizis multajn seminariojn de AEH en Skokovy kaj plu gvidas lokan klubon kaj instruas en la komunuma centro Klementinka.

En 2011 ŝi estis nomumita honora membrino de ĈEA.

JOSEF VOJÁČEK

Li naskiĝis la 18-an de decembro 1943 en Zlín kaj studis en Brno elektroteknikon en Teknika Altlernejo kaj en



Pedagogia fakultato de la Universitato. Li laboris en Dubnica nad Váhom, Praha, Hradec Králové, Ostrava, Vyškov, Brno. Lia specialiĝo fariĝis kleriga kibernetiko, pri kiu li pu-

blikigis sciencajn artikolojn. Li kontribuis al diskonigo de Esperanto kaj interlingvistiko en la faka medio. Doktorecon pri kibernetiko li defendis en 2004 en Esperanto dum la sesio de [AIS San Marino](#), kies asociita docento li fariĝis. Li gvidis en ĝi kurson pri logiko kaj prelegis pri instruado kaj interlingvistiko.

En 2003 Masaryk-Universitato eldonis liajn [lernotekstojn](#) al la video-kurso *Mazi en Gondolando*. Inter 2001 kaj 2013 li gvidis en la Universitato kurson pri Esperanto kiel pri nedevisa studobjekto. Nun alia instruanto daŭrigas kursojn pri interlingvistiko.

Trifoje li helpis organizi en Brno tut-ŝtatan migran ekspozicion pri Esperanto. Li estis plurfoje intervjuata de la regionaj radio kaj gazetaro.

En 2014 li estis nomumita honora membro de ĈEA. Li daŭre aktivas en la Esperantista Klubo en Brno. Pluraj liaj prelegoj spekteblas en la jutuba [videokanalo](#). –padv–

MIROSLAV MALOVEC

Li naskiĝis la 8-an de decembro 1953 en Brno, kie li ĝis nun vivas.



Li esperantiĝis aŭto-didakte en 1968. Liaj ĉefaj meritoj estas en la fakoj vortarista, redakta, cifereciga, instrua, traduka kaj historiografia. En ĈEA li aktivis origine en junulara kaj pedagogia komisionoj kaj multajn jarojn instruis en [SET Lančov](#). Li estas aŭtoro de [Gramatiko de Esperanto](#), kunaŭtoro de *Esperanta-ĉeĥa vortaro* kaj aŭtoro de *Granda ĉeĥa-Esperanta vortaro*.

Ekde 1991 li redaktas la gazeton [Starto](#), ekde 2008 li estas membro de ĈEA-komitato. Al la retejo [Esperanto.cz](#) li kontribuas precipe pri historio de la movado. Li (kun)redaktis eldonon de multaj libroj (tradukoj de Ĉapek, Hašek, Březina, Mácha, Erben, Havel, Foglar k.a.), kunlaboris tiukampe i.a. kun KAVA-PECH. Liaj fakaj kontribuaĵoj regule aperadis en la prelegkolektoj de [KAEST](#).

En 2001 li fondis ĉeĥlingvan Vikipedion kaj al la [Esperantlingva Vikipedio](#) li grave kontribuis per kelkmil artikoloj precipe pri Ĉeĥio kaj pri Esperantomovado.

Li kuntradukis ekz. *Lumon en tenebroj*

pri Komenio de Kožík, rakontojn de Hašek kaj pliajn librojn eldonitajn en [KAVA-PECH](#), tradukis poemojn de ĉeĥaj poetinoj (Ludíková, Bergrová, Erbová) k.a. Li kunkreis scenaron por *El la vivo de insektoj* de fratoj Ĉapek surscenigitan dum UK 2016. En 2018 li esperantigis la operon [Sternenhoch](#) de Ivan Acher, sukcese prezentitan en la Nova Scenejo de la Nacia Teatro en Prago.

Ekde 2001 li okupiĝas pri ampleksa sistema ciferecigado de tekstoj rilataj al Esperanta literaturo kaj movado. Lia artikolo *Estonto de la cifereca mondo* aperis en la prestiĝa UEA-prelegkolekto *La arto labori kune*. Li aktivis ankaŭ en la laboroj por Esperanto-Muzeo en Svitavy.

Inter 2009 kaj 2021 li estis prezidanto de la [Esperantista Klubo en Brno](#), al kies programoj li plu kontribuas per siaj valoraj [prelegoj](#). Li kreis [retejon pri Esperanta literaturo](#), [kluban retejon](#) kaj esperantigis retejon pri la infana gazeto [Vedem](#) el la geto Terezín. Li plurfoje aperis en la regionaj radio kaj gazetaro. Listo de liaj verkoj troveblas en [Vikipedio](#). En 2011 li estis nomumita honora membro de ĈEA.

–padv–

Mia persona bondeziro

Kara Mirek, mi sentis devon persone gratuli al Vi. Mia rilato al Vi nomiĝas estimo kaj respekto.

Ni konas unu la alian de nia junaĝo, de la Somera E-Tendaro en Lančov.

Fartu bone, estu sana, havu fortojn por Via laboro ne nur por Esperanto, sed por la vivo entute, estu ĝoja kaj kontenta!

Sincere Leonka

Ekspozicio en Tajvano pri ĉeĥa vojaĝisto-esperantisto

Ekde septembro 2023 ĝis marto 2024 estas en Tajvano ekspozicio dediĉita al ĉeĥa vojaĝisto **Bohumil Pospíšil** (1902-1974), kiu estis membro de UEA - tiun fakton la ekspozicio mencias. Li naskiĝis en Píseč, kiel 18-jara entreprenis sian unuan vojaĝon, nome al sovetia Ruslando. Post la reveno lia kunulino Klementina Šebestová naskis al li tri infanojn. Ili komune transloĝiĝis al Prago.



En 1926 li ricevis legitimilon de UEA kaj samjare ekvojaĝis al aziaj kaj oceaniaj landoj (Turkio, Ĉinio, Mongolio, Japanio, Filipinoj, Sumatro) kaj atingis Sidnejon. Tie li enamiĝis kaj edziĝis en 1930 al Elizabeta Shannon.

En 1934 li forvojaĝis al Arabio, poste tra Nov-Zelando al Formoso, nuna Tajvano, kie li ŝajne mortis dum tertremo. Sed en 1945 li fariĝis prezidanto de *Ĉeĥoslovaka Asocio* en Nov-Zelando. Poste la informoj pri lia vivo mankas.

*Laŭ ĉeĥa Vikipedio
inkluzive de fotoj*

P.S. La ekspozicio havas anglan titolon: **Czechoslovakia, a Traveler, and Formosa in the 1920s: A Special Exhibition**
www.nmth.gov.tw/en/exhibition

Klubo Laurus honorigis Blanka Čuhelová

Blanka Čuhelová estas eksa direktorino de la Urba Muzeo kaj Galerio de Svitavy kaj havas grandajn meritojn pri la fando de nia muzeo.

La klubo Laurus estis establita en 1998 por honorigi civitanojn de Svitavy, kiuj famigis la urbon kaj levis ĝian kulturen nivelon. Ĉiujare estas honorigita iu eminentulo, ekz. historiistoj, kuracistoj, teatristoj, fotografoj, muzikistoj, pedagogoj ktp.

Ĉi-jare la 24-a laŭreato fariĝis Blanka Čuhelová (*1957), kiu post lernado en loka gimnazio iris studi al Masaryk-universitato en Brno (tiam nomata Purkyně-universitato).



Ekde 1976 ŝi laboris en diversaj postenoj de la urba muzeo en Svitavy, ekde 1992 ĝis emeritiĝo en 2020 kiel direktorino. Ekde 2002 ŝi laboras en kultura komisiono de la magistrato.


Post 1989 ŝi zorgis pri reveno de la originaj muzeaj kolektoj, pri savo de la Ottendorfer-biblioteko, konstruis daŭrajn ekspoziciojn *Historio de tolaĵ-lavado*, *Serĉado de Davida Stelo* (pri holokaŭsto kaj Oscar Schindler), *Labirinto de historietoj en Svitavy* kaj helpis fondi nian *Esperanto-muzeon*.

Grandan atenton ŝi dediĉis al vidartistoj, ekz. al skulptaĵoj de A. Petrus kaj al formoj de strat-arto: Viva Muro, Galerio Venkovka, Klicperka. Ŝi estis ĉe estiĝo de Kristnasko kaj Pasko en la muzeo, karnavala procesio tra la urbo.

Libere laŭ Milan Bába

Jaromír Canibal (1947-2023)

MUDr. Jaromír Canibal el Karviná forpasis la 28-an de oktobro 2023. Li estis multjara estro de iama ŝaka sekcio de ĈEA, redaktoro de informilo Esperanta Ŝako por EŜLI (Esperanta Ŝak-Ligo Inter). Plie membro de neesperantista Internacia Federacio por Koresponda Ŝako (International Correspondence Chess Federation) kaj ĝia ĉeĥa sekcio, kiuj informis pri lia forpaso.



Erich-Dieter Krause (1935-2023)



Prof. Dr. Erich-Dieter Krause estis vortaristo kaj leksikografo pri Esperanto kaj ĉe la Orientazia Instituto de la universitato de Leipzig en Germanio pri la indonezia lingvo. Li estis membro de Akademio de Esperanto kaj de la redakta komitato de la faka periodaĵo „Esperantologio“ (Esperanto Studies).

Li estas konata kiel aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj indoneziaj-germanaj kaj ankaŭ de la plej grandaj germanaj-esperantaj vortaroj, kiuj tre helpis ĉe kreado de niaj vortaroj. D-ro Krause forpasis la 18-an de oktobro 2023 en la aĝo de 88 jaroj.




Imre Ferenczy (1932 – 2023)

D-ro Imre Ferenczy forpasis la 1-an de septembro 2023 en sia 91-a jaro. Esperanton li lernis en 1950. En 1955 li kunfondis Hungarlandan Esperanto-Konsilantaron kaj ekde 1985 dum jardekoj li estis prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Li apartenis al redaktantoj de Medicina Internacia Revuo (MIR) kaj samtempe gvidis radioamatoran sektion de fervojistoj estante estrarano de hungara fervojista organizaĵo. Li estis Honora Membro de HEA, Honora Membro de UEA kaj Honora prezidanto de UMEA. Aŭtoro de *Esperanta Medicina Vortaro* (2009) kaj *Mi estis fervojista kuracisto* (2012).



109- UK 2024 en Aruŝo



Ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Aruŝo, tanzania urbo sub la monto Kilimanĝaro. En Afriko nia movado kreskas kaj la kongreso celas puŝi ĝin antaŭen. En aŭgusto tie estas agrabla vetero ĉirkaŭ 25 Celsius-gradoj.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální adresa@esperanto.cz

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisen-bank, č. ú. 101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
54. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2024

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 54-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 1.2.2024

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!
<http://esperantobrna.cz>

2023-12-06 Zamenhofa tago, Klementinka,
Mladá Boleslav

2023-12-13 Zamenhof-festo Bratislava
<https://eventaservo.org/e/f51dd9>

2024

2024-09-17/29 ĈEA-konferenco en Česká
Třebová Střední škola technická a dopravní
Gustava Habrmana Česká Třebová
Info: komitato@esperanto.cz

Esperanto por UN



Nova retejo <https://esperantoporun.org>
donas informojn pri Esperanto kaj UN,
enhavas dokumentojn pri UN, inter ili
Informilon Esperanto kaj UN, kaj
ankaŭ **Traduk-terminaron Esperan-
tan-Anglan** por tradukantoj de oficialaj
dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj. Ĝi
estis unue publikigita de UEA en 1976,
kompilita de Victor Sadler kaj Hum-
phrey Tonkin. Ĝia celo estis enkonduki
iom da normeco kaj konsekvenceco en
esperantigo de la tamen komplika
terminaro pri UN kaj, pli ĝenerale, en
tradukado de oficialaj dokumentoj en
Esperanton.

Laŭ Informilo por Interlingvistoj n-ro 125



Komuna kantado en Prudká



*25 jaroj de E-mental'
Prelego de Vlasta Piščíková en Prudká*



Ĝardena fervojo en Drásov



Lingva ludo en Prudká



*Kunveno en Esperanto-Muzeo
okaze de 90 jaroj de Esperanto en Svitavy:
prelego de Jiří Tomeček
pri la nova asocia retejo*



*Kunveno en Esperanto-Muzeo
Prezento de japana broŝuro kun medaliono
pri Jan Duda*

